

SCIENCA REVUO	El Vol. 21
de Internacia	
Scienca Asocio	n-ro 6(86)
Esperantista	
(BEOGRAD, Jugoslavio)	5. 12. 1970.

AŬSTRA LITERATURO KIEL LIGILO INTER LA POPOLOJ

(la prelego en la Internacia Somera Universitato, Vieno, 1970.)

Prof. d-ro E. Görlich (Vieno, Aŭstrujo)

Antaŭ ol ni okupu nin pri nia temo, bonvolu permesi al mi kelkajn rimarkigojn. Unu el inter niaj plej famkonataj aŭstraj verkistoj, **Hermann Bahr** (Herman Bar), skribis iuloke: »Jen, estas malbonŝanco por Aŭstrujo, ke la aŭstra historio estas verkita de ĝiaj kontraŭuloj. Mi kompletigas ĉi tiun frazon de la eminenta aŭtoro per mia suplemento: jes, estas malbonŝanca fakto, ke multaj homoj, ankaŭ multaj aŭstroj, ne konas la aŭtentikan historion de Aŭstrujo. La kaŭzoj de ĉi tiu fakto estas diversaj: oni toleris jam en la epoko de la habsburga monarkio, ke oni interpretu malĝuste la aŭstran historion. Tro ofte historiistoj, aŭstraj aŭ neaŭstraj, skribis pri Aŭstrujo laŭ dinastiaj kaj ne laŭ naciaj vidpunktoj. La registaro subtenis tian skribmanieron. Ekzemple: la imperiestro **Franz I** (Franc la Unua), kiu regis en la epoko de la militoj kontraŭ Napoleono, forstrekis la vorton »patrolando« for el la militmanifesto kaj anstataŭigis ĝin per la vorto »imperiestro«.

En la pasinta 19-a jarcento germanŝovinistaj aŭtoroj kaj fihistoriistoj interpretis malĝuste kaj konforme al siaj partiaj deziroj la aŭstran historion. En Aŭstrujo ofte, tre ofte — kaj parte eĉ hodiaŭ — la vorto »nacia« signifas »german-nacia« kaj ne »aŭstra-nacia«, do tute kontraŭe al la kutima uzo en la aliaj landoj. La tiel nomataj naciaj partioj en Aŭstrujo ne estis »aŭstra-naciaj« partioj, sed ili estis »german-naciaj« partioj laŭ la kutime uzata vortsignifo, kelkfoje, ĉefe en la epoko de la aŭstra respubliko, eĉ kontraŭe al la aŭstra memstareco kaj suvereneco. En la libro »Mein Kampf« (»Majn Kampf« = mia batalo) de **Adolf Hitler** ni legas lian konfeson, ke profesoro en la supera lernejo, kiun li vizitis en la urbo Linz (Linc, Supra Aŭstrujo), instruis al li tiamaniere, ke li fariĝis kontraŭulo de Aŭstrujo. Jen, la sama profesoro, kiu ricevadis siajn salajrojn de la aŭstra ŝtato. Fakto, kiu estis ebla en Aŭstrujo.!

La vero pri ekesto de »Ostmark«

Bedaŭrinde, tre bedaŭrinde, ankaŭ la mallongeta skizo sub titolo »Aŭstrujo«, en la kongresa libro de la 55-a Universala Kongreso de Esperanto — vidu la paĝon 15! — estas kolekto de malĝuste interpretitaj faktoj aŭ malkorektaĵoj. Ekzemple: oni povas legi, ke Karlo la Granda fondis ĉe Danubo »Ostmark« kiel defendaĵon kontraŭ la — Hunoj (!!). Fakte la Hunoj regis en la Danub-valo tri jarcentojn (!!)) antaŭ Karlo la Granda. Kròme, la plej granda aŭstra historiisto en la du jardekoj post la Dua Mondmilito, **Alphons Lhotsky** (Alfons Lotski), deklaris jam en sia parolado en la Akademio por sciencoj en Vieno en la jaro 1946., ke la vorto »Ostmark« ne ekzistas en la historiaj dokumentoj de la mezepoka periodo. Hodiaŭ nur nekonatuloj aŭ naciŝovinistoj uzas la vorton Ostmark«, kiun oni inventis en la 19-a jarcento. Jam en la romana epoko la tielnomita »Regnum Noricum« (»Regnum Norikum« = la regno de Norikoj, kelta popolo en la orientaj Alpoj) ekzistis sur la teritorio de la nuna aŭstra respubliko. La vorto »Noricum« devenas el la kelta lingvo: ĝi signifas »Österreich« aŭ »Ostarrichi« (»Esterajh« aŭ »Ostarihi«), nome en Esperanto »regno en la oriento«. Ankoraŭ hodiaŭ oni uzas la vorton »nor« aŭ »noir« en la skotlanda kelta lingvo; kaj »nor« aŭ »noir« signifas en la germana lingvo »Ost« (oriento). La kelta vorto »ric« aŭ »righ« estas la germanlingva »Reich« (»rajh« = regno). »Um« estas la latinlingva finaĵo de la kelta vorto »Noric«. Tiamaniere la landnomo »Österreich« (»Aŭstrujo«) estas pli malnova ol la epoko, en kiu Karlo la Granda regis.

Ankaŭ la loĝantaro de la hodiaŭa Aŭstrujo havas diversnecian devenon. En la plej malnova epoko de la aŭstra

historio ni trovas Ilirojn kaj poste Keltojn, du hindo-eŭropajn popolojn, sur la aŭstra teritorio. Ankoraŭ hodiaŭ multaj nomoj de lokoj, montoj aŭ riveroj en Aŭstrujo devenas el la ilira aŭ kelta lingvoj. Ekzemple: Vieno, Alpen (Alpn), la rivereto Erlauf, Glan — rivereto kaj multaj aliaj. Poste la Romanoj okupis la regnon de Norikoj. Tiam multaj diversneciaj homoj enmigris el la tuta romana imperio en la novajn provincojn. Ĉefe anoj de la romana armeo ekloĝis en norikaj urboj kaj vilaĝoj, se ili estis pensiiĝintaj, kaj ofte ili prenis keltajn knabinojn kiel edzinojn. Tiamaniere ankaŭ la Keltoj komencis paroli la latinan lingvon, pli bone dirite, latinan dialekton. Dum la epoko de la eŭropa popolmigrado germanaj popoloj marŝis ankaŭ tra Aŭstrujo sed ili ne ekloĝis ankoraŭ en la lando. Post la fino de la popolmigrado slavaj triboj eniris en Aŭstrujon. Etimologie multaj nomoj devenas ankaŭ el slavaj lingvoj. Ekzemple: Graz (Grac, ĉefurbo de la aŭstra federacia lando Stirio), Leibnitz (Lajbnic, Stirio), Gloggnitz (Glognic, Malsupra Aŭstrujo), Melk (Melk, Malsupra Aŭstrujo), Liesing (Lizink, vilaĝo kaj rivereto en la Malsupra Aŭstrujo) kaj multaj aliaj.

Post Iliroj, Keltoj, Romanoj kaj Slavoj la germana aŭ teŭtona tribo de bavaroj alportis sian lingvon en Aŭstrujon. La bavaroj okupis senhomajn regionojn; en aliaj partoj de Aŭstrujo ili miksis sin kun la malnova loĝantaro. Ankoraŭ en mezepokaj tempoj la latinlingvaj Keltoj, la »Walen« aŭ »Walchen« (»Valen« aŭ »Valhen«), kaj Slavoj loĝis en la mezo de germanlingvaj aŭstroj. Hodiaŭ ni trovas ankoraŭ slovenojn (Alpaj slavoj) en la suda Karintio. Dum la epoko de bataloj kontraŭ la turkoj enmigris aliaj slavoj, la kroatoj en la plej orientan regionon de Aŭstrujo, en Burgenlandon.

Dum du kaj duonia jarcentoj la dinastio de Babenbergoj regis en Aŭstrujo, unue kiel limgrafoj, poste kiel dukoj. La lastaj Babenbergoj prenis orientromanajn aŭ bizanciajn imperiestrajn principojn kiel edzinojn. Bizancia aŭ greka kulturo influis al Aŭstrujo: En la epoko de la unua aŭstra duko, Henriko la Dua, kaj lia edzino Teodora, nevino de la orientromana imperiestro Manuĉo Komneno, Vieno fariĝis ĉefurbo de Aŭstrujo; oni nomis ĝin greklingve »Vindopolis«. La dukino Teodora estis eskortita de grekaj gardistoj kaj grekaj korteganoj, kiam ŝi venis en Vienon. De post tiu tempo ekzistis greka kolonio en la aŭstra ĉefurbo. Post la estingigo de la Babenberga familio la reĝo Otokaro la Dua de Bohemlando unuigis Aŭstrujon kun sia regno. La aŭstroj vidis en Otokaro tiranon aŭ okupanton sed legitiman heredanton de la Babenberga dinastio. En la milito de Otokaro kontraŭ Rudolfo de Habsburg, la novelektita romana reĝo, subtenis la vienanoj Otokaron. Sed bohemiaj kaj aŭstraj nobeloj konspiris kontraŭ Otokaro, kiu estis granda amiko akj protektanto de la burĝaro.

Otokaro la Dua pereis dum la batalo sur Marchfeld (Marchfeld, kampo ĉe la rivero March), proksime al Vieno. La venkinto, Rudolfo de Habsburg, transdonis la regadon super Aŭstrujo al sia filo Alberto la Unua. Tiamaniere la habsburga dinastio ekregis. La habsburgaj dukoj, poste ĉefdukoj de Aŭstrujo, unuigis la landojn en la orientaj Alpoj kaj fondis la habsburgan Danubvalan imperion, kiu konsistis el Aŭstrujo, Hungarujo kaj Bohemlando. Dum kelka tempo idoj de Rudolfo de Habsburg regis ankaŭ en Hispanujo kaj en grandaj partoj de Italujo. Fak-

toj, kiuj estas rimarkindaj, ĉar la evoluo de la aŭstra popolo dependas de tiuj ĉirkonstancoj. La itala kaj hispana kulturoj influis la aŭstran kulturon. Se la aŭstroj akcentas »Mathematik« («Matematik») kaj »Zeremonie« (Ceremonie), la germanlandanoj kontraŭe akcentas »Mathematik« kaj »Zeremonie«. La kaŭzo de la diferenco de akcentoj estas la fakto, ke la vortoj »Matematik« kaj »Zeremonie« estis adoptitaj en Aŭstrujo el la itala, kaj en Germanlando el la franca lingvo.

!Jam en la unuaj jarkoj de la moderna epoko la viena **Wolfgang Schmetzl** (Wolfgang Smetzl), instruisto en la lernejo de la »Schottenkloster« («Sotnkloster» = monaĥejo de skotoj), skribis en sia »Lobspruch der hochberühmten Stadt Wien« («Lobspruch der hochberühmten Stadt Wien» = panegiraĵo por la famkonata urbo Vieno), ke oni aŭdis la germanan, italan, hispanan, hungaran, boheman, sirian, hebrean, araban, turkan, latinan kaj grekan lingvojn sur la »Stephansplatz« («Stefansplac» = placo de la sanktulo Stefano), en la mezo de la urbo. Dum la baroka epoko — jen, la baroka estis la stilo, kiu estas tipa por la tiama Aŭstrujo — dramoj de hispanaj aŭtoroj, ekzemple de Calderon (Kalderon) kaj de **Lope de Vega**, estis prezentataj en Aŭstrujo; kelkaj el ili eĉ havis sian premieron en Vieno. En raportoj de ambasadoroj de la respubliko Venecio ni legas pri kontento de la skribintoj, ke ili loĝis en Vieno. Ili supozis, ke ili estus en Italujo, hejme, ĉar ĉiu homo scipovis la italan lingvon. La granda aŭstra lirikisto, **Cristoph de Schallenberg** (Kristof de Šalberg), naskita en la Supra Aŭstrujo, studadis en Italujo, poste li estis kortegano en la kortego de la ro-

mana imperiestro Maksimiliano la Dua. En Vieno li kolektis aron da amikoj kaj imitantoj, simile al la samtempa franca poeta cirklo »La Plejado«. Schallenberg mem estis influita de la itala poeto Petrarca (Petrarka). Li estis peranto de la itala literaturo al Hungarujo, kie vivis la hungara lirikisto **Valentino Balasa**.

La itallingva literaturo trovis sian hejmlandon ankaŭ en Aŭstrujo. Jen, en la deksepa kaj dekoka jarcentoj multaj italaj aŭtoroj loĝis en Aŭstrujo kaj verkis tie. Famkonata estis la baroka teatra ludo. Oni prezentis dramojn je memoro de naskiĝtago de la imperiestro, de la imperiestrino aŭ de la kronprinco. La plej bonkonata kaj la plej grandega dramo estis »Il pomo d'oro« (»Il pomo doro = la ora pomo), prezentita en la jaro 1666., kiam la imperiestro Leopoldo la Unua edziĝis kun sia kuzino, princino Margareta de Hispanujo. La aŭtoro de la festludo estis **Marcantonio Cesti** (Markantonio Ĉesti). La aŭtoro de la muziknumeroj nomiĝis **Bertali**; la dancojn verkis la vienano **Johann Schmelzer** (Johan Ŝmelcer). La enhavo de la dramo estis ĉerpita el la greka mitologio — la juĝo de la reĝfilo Pariso. La kortega arkitekto Ludovico Burnacini (Ludoviko Burnaci) konstruis la dekoraciojn en admirinda luksa maniero. Mil aktoroj estis okupataj dum la premiero de la festludo, kvin mil spektantoj vizitis ĝin. La enspezoj de la prezentaĵoj estis 100.000 florenoj aŭ guldoj. La tri habsburgaj imperiestroj Leopoldo la Unua, Jozefo la Unua kaj Karlo la Sesa estis aŭtoroj de komponaĵoj. Ili ne nur estis amatoroj de la muzikarto, sed ili estis veraj artistoj. Ekzemple Leopoldo la Unua verkis 79 komponaĵojn por prezentado en preĝejoj, krome 180 komponaĵojn en alia maniero. En la jaro 1685. la ĉefdukinoj Mariana kaj

Leonora estis aktorinoj en la imperiestra muzikdramo »La sklavinioj de la insulo Samos«.

La plej konataj itallingve verkintaj aŭtoroj en Vieno estis **Apostolo Zeno** kaj **Pietro Metastazio**. Apostolo Zeno, naskita en Venecio, estis nomita imperiestra korteg-historiisto, de Karlo la Sesa. Li loĝis en Vieno ĝis la jaro 1729. Post sia reveno en Italujon li mortis en Venecio en la jaro 1750. Pietro Metastazio — lia vera nomo estis Trapassi (Trapasi) — estis publikiginta jam siajn unuajn poemojn, kiam li venis en Vienon. Karlo la Sesa nomis lin imperiestra korteg-poeto. Metastazio loĝis en Vieno de la jaro 1730. ĝis sia morto, en la jaro 1782., do dum pli ol kvindek jaroj. Liaj pensoj, sentoj, kaj simpatioj estis aŭstremaj. Ni legas en liaj leteroj pri la venko de »niaj soldatoj« kaj li aludis al la aŭstraj armeoj per tiuj vortoj. La granda imperiestrino **Maria Theresia** (Mario Terezia) estis »mia imperiestrino« por Metastazio. En la itala nacia preĝejo de Vieno ni trovas monumenton de la granda poeto. Lia tombo troviĝas en la Michaelerkirche (Mihaelerkirche — preĝejo de la sanktulo Mikaelo).

Ekesto de memstara aŭstra literaturo

La evoluo de la aŭstra literaturo kiel memstara literaturo komenciĝis en la epoko de Maria Terezia. La imperiestrino estis la unua filino de Karlo la Sesa. Pro tio, ke la imperiestro ne havis filon kiel heredonton, li dekretis en la tielnomata »Pragmatika Sankcio« sian filinon kiel heredontinon en la tuta habsburga imperio, Maria Terezia edziniĝis kun la princo Francisko Stefano, ŝia kuzo, en la familio de duko de Loreno. Maria Terezia kaj ŝia filo, la imperiestro Jozefo la Dua, evoluigis Aŭstrujon en moderan ŝtaton. La duo-

na jarcento da regado de la du grandegaj personoj el la habsburga dinastio estis »la ora epoko« por Aŭstrujo kaj por la aŭstroj. Dum la regado de Maria Terezia kaj de Jozefo la Dua ankaŭ la kulturoj rilatoj inter la diversaj nacioj kaj popoloj de la habsburga imperio pligrandiĝis. La politiko de edukado kaj instruado protektis ĉefe la serbajn kaj rumanajn regionojn. En la tiama aŭstra provinco Banat, hodiaŭ situanta parte en Jugoslavio parte en Rumanujo, **Teodor Janković** estis ĉefo de la agado por edukado kaj instruado de la loĝantaro. En la jaro 1772. la aŭstra registaro eldonis ĉirkaŭ 3.000 lernolibrojn en la serba kaj rumana lingvoj. En la jaro 1778. la aŭstra registaro publikigis 16.000 ekzemplerojn de lernolibroj. La kroata verkisto **Antun Matija Reljković** verkis popularsciencajn broŝurojn kaj librojn por la loĝantaro de la aŭstraj armeaj limdistriktoj laŭ la postulo de la ministerio por militaferoj en Vieno. La armeaj limdistriktoj estis fonditaj dum la epoko de militoj kontraŭ turkoj. En la aŭstra armeo servutulaj vilaĝanoj estis nomitaj kiel oficiroj; ne malofte oni nobeligis ilin ankaŭ. Vieno peris la italan kaj francan literaturojn al la popoloj en la Danubvalo. La kono de la verkoj de la grandaj klasikaj germanlandaj poetoj, ekzemple de Goethe (Gete) aŭ de Schiller (Siler), estis perata per helpo de Vieno. La germanlanda verkisto **Cristoph Martin Wieland** (Kristof Martin Viländ) kaj la aŭstra poeto **Aloys Blumauer**, imitanto de Wieland, estis legataj tre volonte de la amaso de la aŭstra popolo. Imitanto de Wieland estis ankaŭ la ĉeĥa aŭtoro **Francisko Jaromiro Rubeš** kaj la rumanlingva poeto **Johano Budai -Deleano**. La komika eposo „Tiganiada“, verkita de Budai-Deleanu, enhavas la samajn mo-

tivojn kaj la saman karakteristikan stilon kiel „La travestita heroo Enea“ de Blumauer. Alia aŭstra verkisto, scienculo kaj peranto de ideoj de la racionalismo en Aŭstrujo, **Joseph de Sonnenfels** (Jozef de Zonenfels), influis la kultur-aferojn en la Danubvalo. Lian festludeton okaze de la naskiĝtago de la imperiestrino Maria Terezia en la jaro 1765. tradukis la famkonata hungara lingvisto Revay (Revai) en la hungaran lingvon. La verkoj de Sonnenfels estis tre legataj; oni uzis liajn prozaĵojn kaj faklibrojn — Sonnenfels estis universitata profesoro pri la publika juro — en la universitataj prelegoj. La regeneracio de la naciaj literaturoj de la popoloj en la Danubvalo havis sian eliron ekde Vieno. La moderna hungarlingva literaturo naskiĝis en kazerno de la hungara nobela gardistaro en Vieno. Aŭstraj registaroj donis la unuan impulson por uzo de la serba popollingvo kiel literatura lingvo. En la universitato de Vieno la granda sudslava lingvisto **Vuk Stefanoviĉ Karadžiĉ** vizitis prelegojn de la famkonata slovena lingvisto **Jernej-Bartol Kopitar**. La rumana lingva scienco progresis: **Samuelo Klein** kaj **Georgo Sincai** eldonis la unuajn sciencajn gramatikojn de la rumana lingvo. La du ĉeĥaj lingvistoj, **Jozefo Dobrovsky** (Jozefo Dobrovski) kaj **Johano (Jan) Kollár** (Kolar), estis profesoroj pri la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj ĉe la universitato de Vieno. En la jaro 1790. la unua novgreka presejo fondiĝis, en la sama jaro aperis la unua novgreka vortaro. La unuaj pioniroj de la novgreka kulturo kaj literaturo estis ĉefkunlaborantoj de la revuo „Gelehrter Hermes“ („Gelerter Hermes“ = erudicia Hermes), kiun oni eldonis en Vieno. Ĉi-loke loĝis la antaŭbatalanto de la novgreka aŭtonomia movado, **Rhigas Velestinli** (Ri-

gas Velestinli), de post la jaro 1796. La grekaj konspirantoj kontraŭ la turka registaro kunvenis en la kafejo Herzog (Hercog) en la unua distrikto de Vieno. La armenaj Meĥitaristoj, ordeno de monaĥoj, transloĝiĝis el Venecio al Vieno kaj daŭrigis tie siajn laborojn por evoluo de la armena kulturo kaj literaturo. Ili loĝas en Vieno ĝis hodiaŭ.

Ankaŭ la unuaj revuoj, ĵurnaloj kaj gazetoj, skribitaj en lingvoj de la popoloj de la habsburga monarkio, estis forsenditaj en la mondon el Vieno. Vienaj lud-aktoroj vojaĝis trans vastaj regionoj de la tiama monarkio. Jam en la jaro 1728. oni prezentis komediojn en Beograd, al nuna ĉefurbo de Jugoslavio, tiam okupita de la aŭstra armeo. Ankaŭ en Budapest kaj en Bratislava teatraj direktoroj engaĝis vienajn lud-aktorojn; oni vendis la teatrajn biletojn kontraŭ la sama prezo kiel en Vieno. En Hungarujo la viena registaro malpermesis la prezentadon de ludoj, komedioj au dramoj; kiuj ne estis prezentataj en Vieno minimume dufoje (1793.). La fondinto de la unua serblingva teatro **Joakim Vujić**, estis iama aktoro ĉe la hungarlingva teatro en Budapest. En Bratislava **Matthias Rath** (Matias Rat) publikigis la hungarlingvan ĵurnalon „Magyar hirmondo“ (»Madar hirmondo«) de post la jaro 1780. Aliaj gazetoj sekvis: en la jaro 1791. la serba gazeto „Serbskije Novini“ kaj la novgreka revuo „Ephemeridis“ („Efemeridis“), en la jaro 1797. la slovena publikaĵo „Lublanske Novize«. De post la jaro 1794. oni projektis la eldonon de rumanlingva ĵurnalo ankaŭ en Vieno.

En la aŭstra ĉefurbo la antaŭulo de la granda klasika aŭstra literaturo de la venonta 19-a jarcento, **Philip Hafner** (Filip Hafner), loĝis en la epoko de la imperiestrino Maria Terezia. Lia plej eminenta prozaĵo estas »Songes Hanswurstiques« (Sonĵ Hansvurstik« = sonĝoj de arlekeno). En ĉi tiu verko la aŭtoro priskribis detale la morojn kaj kutimojn de la tiama »gaja malnova Aŭstrujo«: la diversajn karakterojn de kamparanoj kaj de la burĝaro. Hafner estis unu el la unuaj, kiuj kritikis la vivcirkonstancojn de amaso de la popolo laŭ sociala vidpunkto. Li estas fondinto de la tipa aŭstra popola dramo, kies majstroj **Ferdinand Raimund** kaj **Johann Nepomuk Nestroy** (Johan Nepomuk Nestroj) estis en la 19-a jarcento. La »Bürgerliche Dame« = burĝa sinjorino), prezentita en la jaro 1765. en Vieno, sukcesis plene. La »Neue Burlesque« (Noje Burleske« = nova burlesko), la lasta verko de Hafner antaŭ lia tro frua morto, estas komparebla kun la komedioj de William Shakespeare (Uiljem Ŝekspir).

La »klasika periodo« de la aŭstra literaturo — kiel ni menciis jam — la epoko inter la Dua Viena Kongreso kaj la komenciĝo de la revolucio en la jaro 1848. La plej grandaj aŭstraj poetoj estis: **Franz Grillparzer** (Franc Grilparcer), **Ferdinand Raimund** kaj **Adalbert Stifter**. Grillparzer estis grandega dramverkisto, Raimund estis ludaktoro kaj aŭtoro de majstre verkitaj popolaj kaj fabelecaj dramoj, Stifter priskribis en siaj prozaĵoj la aŭstrajn pejzaĝojn en majstra kaj mirinda maniero Dum la militoj kontraŭ Napoleono la aŭstra patriotismo vekigis. La aŭstra ŝtata kanceliero grafo Stadion (Ŝtadion) deklaris: »Ni estas nacio nun«. Aŭstraj poetoj kaj verkistoj —

ekzemple la fratoj **Collin** (Kolen) aŭ la roman-aŭtorino **Karolina Pichler** (Pichler) — ĉerpis aferojn el la historio de diversaj nacioj en la Danub-valo. En la aŭstraj teatroj oni prezentis ankaŭ ludojn, kies herooj kaj heroinoj interprenis personojn el la nacia tradicio de Hungarujo, de la bohemiaj kaj de la sudslavaj landoj. Grillparzer publikigis sian patriotan dramon »König Ottokars Glück und Ende« (»Keniĥ Otokars Glik und Ende« = feliĉo kaj fino de la reĝo Otokar). Tre bedaŭrinde li miskomprenis la grandan boheman reĝon en lia karaktero; li intencis verki dramon pri Napoleono. Sed li sciis bone, ke la aŭstra registaro ne tolerus prezenton de dramo, en kiu oni pritraktus aferojn de la nuntempo. Alia aŭstra poeto, hodiaŭ nekonata, **Uffo Horn** (Ufo Horn), korektis la mankon de la dramo de Grillparzer, sed li ne havis la saman grandan talenton kiel la plej granda aŭstra dramverkisto. Pro tio la dramo de Uffo Horn estas forgesita nun. En aliaj dramoj Grillparzer adaptis materialojn en la hungarlanda kaj el la bohemia historioj. Estas stranga hazardo, ke la granda hungara dramverkisto Jozsef Katona (Jozef Katona), samtempulo de Grillparzer, pritraktis en sia dramo »Bánk-Bán« la saman historian aferon kiel Grillparzer en la dramo »Ein treuer Diener seines Herrn« (»Ajn trojer Diener zajnes Hern« = fidela servisto de sia mastro). Estus tre interese kompari la du dramojn: la dramon de la hungara poeto kaj la dramon de la aŭstra poeto. Ni vidus la hungaran kaj la aŭstran konceptojn pri la sama epizodo el la mezepoka hungara historio. Mi mem raportis pri la du dramoj, pri iliaj egalecoj kaj iliaj diversecoj, antaŭ kelkaj jaroj en la viena »Colegium Hungaricum« (»Kolegium Hungaricum« = hungara kulturinstituto en Vieno). Sed ĉi-loke mankas la tempo kaj la spaco. En unu el siaj dramoj Grillparzer, en »Libussa« — la heroino estas fabela princino el la bohema mita prae-tempo — gloris la fondiĝon de la bohema ĉefurbo Praha. Grillparzer estis tipa aŭstro. Li uzis kutime specialajn aŭstrajn esprimojn en siaj verkoj. Li difinis sian skribmanieron per la frazoj: Mi parolas la lingvon de mia patrolando; mi ne estas interesiĝinta pri la lingvo de fiinstruantoj el Lejpcih (Lajpcih) aŭ pri la lingvo de la poeta rondo el Dresden (Drezden). Du jarojn antaŭ sia morto, en la jaro 1872., Grillparzer diris al sia konatulo Foglar laŭvorte: »Mi ne estas germano, sed aŭstro«.

Simileco de la tiamaj literaturoj en la Danub-valo

La spirita parenceco en la poetaj konceptoj inter la germanlingve verkantaj verkistoj en la habsburga monarkio kaj la hungaraj, ĉeĥaj aŭ sudslavaj aŭtoroj estis tre granda en la unua duono de la 19-a jarcento. La plej famkonata ĉeĥa verkistino, **Božena Nemcova** (Bojena Nemcova), cetere naskita en Vieno, verkis sian romanon »Babička« (Babiĉka = avineto) en la stilo kaj en la maniero de la romanoj de Adalbert Stifter. Adalbert Stifter, en la dediĉo de sia romano »Witiko« (»Vitiko«), mem nomis la boheman ĉefurbon Praha »ĉefurbo de mia partolando«. La ĉeĥa ludakto kaj dramisto **Josef Kajetán Tyl** (Jozef

Kajetan Til) estas aŭtoro de komedioj, kiuj estas verkitaĵoj en la maniero de komedioj de Ferdinand Raimund. Ni mencias la »Sakfajfiliston de Stratonice« kaj la »Vizion de Georgo«. Ĉefe »La ribelema virino« havas la saman motivon kiel la komedio de Raimund »La reĝo de l' Alpoj kaj la mizantropo«. Eble la germanlingva aŭstra kaj la ĉeĥa literaturoj alproksimiĝis en neniu epoko de siaj historioj tiommaniere kiom en la vivtempo de Raimund kaj Tyl. Ankaŭ la plej bela novelo de la ĉeĥa aŭtoro **Francisko Jaromiro Rubeš** »Sinjoro Amanuensis en la kamparo serĉante novelon« havas la saman belartan tendencon de la epoko. Karakteristika estas la »Österreichische Nationalencyklopädie« (»Esternajhiŝe Nacionalenciklopedio« — Aŭstra nacia enciklopedio) en kiu la eldonantoj unuigis senpartie grandajn kaj eminentajn aŭstrajn, hungarajn, ĉeĥajn, sudslavajn personojn kaj en kiu monumentoj, urboj, pejzaĝoj, folkloraj kutimoj kaj aliaj sciendaĵoj el ĉiuj landoj de la habsburga morarkio estis priskribitaj.

Jen, rigardante la epokon de fino de la militoj kontraŭ Napoleono ĝis la komenciĝo de la revolucio en la jaro 1848, ni konstatas, ke la literaturoj de popoloj en la Danub-valo ofte havas la saman aŭ almenaŭ similan skribmanieron kaj la literaturoj laŭiras la samajn problemojn. Kelkfoje oni opinias, ke nur la lingvo diferencas la literaturojn de la popoloj kaj nacioj. **La aŭstra literaturo ne estas germana literaturo, sed germanlingva orienteŭropa literaturo.** La aŭstraj poetoj pritraktas temojn kiel: la hungaran ciganon, la ĉeĥan nacimiton, la sudslavan hero-

an bataladon kontraŭ la turkoj, eĉ la husitan militon en la lasta jarcento de la mezepoka tempo. »La tipa aŭstra spirita karaktero« — skribas la hungarlanda profesoro ĉe la budapeŝta universitato pri germana literaturo, **Antal Mádli**, en sia plej nova libro »La politika poeziaĵo en Aŭstrujo, eldonita en Budapeŝt en la jaro 1969. — »naskiĝis en la fundvazo Vieno, sed ĝi estas naskita el multaj kaj diversaj, ne nur el tipaj aŭstraj fontoj: ĝi evoluis en Aŭstrujo, akceptis novajn kvalitojn kaj konservis certajn karakteristikaĵojn. La aŭstra originaleco miksas sin en tipa maniero — pli ol en iu ajn alia eŭroplanda literaturo — kun ĉio, kio alvenis en Vienon el okcidento kaj oriento, el sudo kaj el nordo. Pro tio estas tiel malfacile ekkoni la aŭstran nacian karakteron; legendoj, mitoj, aŭstraj habsburgemaj ideologioj maskas la veran nacian tipon. Efiko kaj kontraŭefiko, influo kaj influigo estas nedivideblaj en la multnacia ŝtata komplekso. Ofte estas malfacile ankaŭ, ne konfuzi faktorojn, kiuj la limojn inter la aŭstra kaj la germana literaturoj foje malklarigas foje tro klarigas, ja eĉ kaŭzis dumtempe supranacian aŭstran literaturon.

Malkreskas la signifo de la germana lingvo

La revolucio de la jaro 1848. finiĝis la epokon. Bedaŭrinde la konstitucio, kiun la popoloj mem rezoluciiis, ne estis aprobita de la aŭstra kontraŭrevolucia registaro. En la dua duono de la 19-a jarcento lingvaj bataloj inter la popoloj de la Danub-valo pligrandiĝis.

Tre ofte oni ne ekkonis kaj ankaŭ hodiaŭ oni ne ekkonas — ke la kaŭzoj de la naciaj lingvaj bataloj estas ĉefe socialaj. La germanlingva burĝaro estis la supera klaso en la habsburga monarkio. Jen, estis la konsekvenco de historia evolucio. La granda slovena poeto, **Franc Prešern**, diris prave en unu el siaj poemoj:

Germanlingvano estas la sinjoro,
slovenparolas la servista koro.

La lingvaj demandoj en la habsburga monarkio estis ligataj al serio de socialaj demandoj. La juna studento, kiu naskiĝis en Hungarujo au Bohemlando, en Moravio, en Galicio, en Transilvanio aŭ en la regionoj de la sudslavaj popoloj, kutime vizitis germanlingvan superan lernejon kaj germanlingvan universitaton. Pro tio li uzis la germanan lingvon. ĉar la uzo de tiu lingvo deklaris lin ano de la supera klaso. Li ne estis germano kaj li ne estis interesigita pri germanlanda nacionalismo. Sed lia scipovo de la germana lingvo plifortigis liajn poziciojn en la supera klaso. Se li reiris hejmen, li estis »doktoro«, eminentulo inter la vilaĝanoj kaj kamparanoj parolantaj la gepatran idiomon. Jen — la unua akto de la lingvobatalada dramo. Sed poste la perspektivoj ŝanĝiĝis. Kiam oni konstatis la valoron de la slavaj lingvoj, multaj homoj forĵetis la neceson, ke oni uzu la germanan lingvon. Studentoj el la slavaj popoloj de la habsburga monarkio estis gvidantoj de siaj samlingvanoj. Oni pretendis la akcepton de la gepatra lingvo ankaŭ en la ŝtataj oficoj. Oni deklaris, ke la

aparteno al la superaj klasoj ne estu ligota al la kono kaj la uzo de la germana lingvo. Tiamaniere ankaŭ en la negermanlingvaj landoj naskiĝis burĝa klaso, kiu parolis sian gepatran lingvon. La evoluo de la konscio en Hungarujo diferencis de la aliaj landoj de la habsburga monarkio. Tie ne ekzistis hungarlingva burĝaro; pro tio ĝi estis anstataŭata de la maleminentaj nobeloj, la tielnomitaj »Gentry«, kiuj gvidis la bataladon por la hungara lingvo. Ankorau en komenco de la 19-a jarcento eminentaj hungaraj nobeloj ne scipovis paroli la hungaran lingvon. Ili parolis france aŭ germane. La oficiala lingvo de la hungara parlamento estis la latina ĝis la mezo de la 19-a jarcento. Eĉ »la plej granda hungaro«, grafo **Stefano Szechény** (Seĉeny), lernis la gepatran lingvon ne pli frue ol kiel matura homo. En siaj taglibroj li uzis ankaŭ pli poste la germanan lingvon laŭ la aŭstra skribmaniero.

La nacioj de la habsburga imperio ne plu komprenis unu la alian. Tre bedaŭrinde ke ne ekzistis internacia lingvo kiel nia Esperanto, kiu estus neŭtrala kaj kiu por ĉiu popolo kaj nacio estus akceptebla. En la jaro 1867. du ŝtatoj formiĝis: la tielnomitaj »landoj kaj reĝlandoj, kiuj sendis delegitojn en vienan parlamenton« — oni nomis ilin nekorekte Aŭstrujo« — kaj la »landoj de la sankta hungara krono«. La iniciatoroj de tiu ŝanĝo intencis, ke en la »aŭstra« parto la germanlingvanoj, en Hungarujo la hungarlingvanoj regu. Efektive en Hungarujo ne regis la popolo, eĉ ne la hungarlingva popolo, sed malgrandeta grupo de grandaj nobelaj familioj. Ili premis ne nur la

alilingvanojn en Hungarujo, sed ankaŭ la hungarlingvaj vilaĝanojn kaj laboristojn. La hungarlanda societo estis ĝis en la plej nova pasinto feŭda au duonfeŭda societo, preskaŭ la lasta en Eŭropo, Aliflanke la »aŭstra« parto de la nova »Aŭstra-Hungara Monarkio« — jen la oficiala nomo de la iama habsburga imperio — estis la batalkampo de diversnaciaj partioj. La germanlingva burĝaro, la fabrikantoj, la altrangaj ŝtatoficistoj, la bankistoj — ĉiuj aspiris al la plej granda influo en la ŝtato, malgraŭ ke la plimulto de la ŝtatanoj estis slavo. En la viena parlamento oni diskutadis ĉiutage kaj ĉiunokte; ofte oni ne diskutadis sed oni fidiskutadis. Diversaj reformprojektoj — ekzemple la ŝanĝo de la aŭstra-hungara monarkio en federacian ŝtaton de liberaj nacioj en la Danubvalo — ne realiĝis. La plej eminentaj pioniroj de tiuj ideoj estis la kronprince Rudolfo, la heredanta princo **Francisko Ferdinando de Este**, kies morto preparis la Unuan Mondmiliton, kaj kelkaj aliaj aŭtoroj de libroj kaj de libretoj, kiuj ĉiuj pritraktis la reformprojektojn. La plej konata el inter tiuj libroj estas »La Unuiĝintaj ŝtatoj de Grand-Aŭstrujo«. Ĝia aŭtoro estis la rumana publicisto **Aurelio Popovici**. Ankaŭ doktoro **Karlo Renner**, eminenta socialisto, la unua ŝtat kanceliero de la aŭstra respubliko kaj la unua aŭstra federacia prezidanto post la Dua Mondmilito, advokatis por la reformo de aŭstra-hungara konstitucio.

Nova aŭstra patriotismo en literaturaj verkoj

Estas interesa fakto, ke en la lastaj jardekoj antaŭ la pereado de la aŭstra-hungara monarkio denove la aŭstra patriotismo naskiĝis en la verkoj de multaj aŭstraj poetoj. Ili deklaris ke Aŭstrujo havas la taskon funkcii kiel

interligilo inter diversaj popoloj en la mezo de Eŭropo. Post la malfeliĉa jaro 1866., kiam Aŭstrujo perdis sian pozicion kiel la unua grandpotenco en la federacio, multaj aŭstroj perdis sian kredon je estonto de la monarkio. Nun la aŭstraj poetoj eltrovis Aŭstrujon denove. La polihistoriisto **Riĥardo de Kralik** eldonis sian »Auŝtran historion«, per kiu li varbis por la tielnomita »aŭstra ideo«. Dum la Unua Mondmilito Kralik verkis sian »Historion de la aŭstra ŝtatideo«. Kune kun li ni nomas Hermann Bahr — ni citis lin ja en niaj unuaj frazoj —, tipa aŭstro, komence liberpensulo kaj germanaciisto, poste vera katoliko kaj defendanto de la aŭstra ideo. En lia romano »Österreich in Ewigkeit« (»Esterajh in Eviĥkajt« — Aŭstrujo en eterno) Bahr enkondukas notarion kiel ĉefpersonon de la romano, kaj tiu diras: »Mi ne vendos la patrolandon! La diablo vin prenu! Pli volonte mi malsatmortos ol ke mi estu germanlandano! Jen, mil kaj mil homoj pensas kiel mi mem! Dank' al dio!« Bahr verkis tiun romanon jam post la pereado de la malnova Aŭstrujo en la jaroj, kiam propagando por la tielnomita »Anschluss« (»Anŝlus« = konekto) al Germanujo estis tre granda. Du aliaj grandaj aŭstraj poetoj, kiuj vivis en nia jarcento, kontraŭbatalis la propagandon por unuiĝo de Aŭstrujo kun Germanlando. Jen, **Hugo von Hofmannsthal** (Hugo fon Hofmansthal), spirita fondinto de la festludoj en Salzburg (Salcburg), kaj la plej granda lirikisto, **Rainer Maria Rilke**. Rilke nomis sin en leteroj al la dukino Gallarati Scotti (Galarati Skoti), loĝanta en Milano, »vera aŭstro, kiu mi estas«, kaj li bedaŭris, ke la »aŭstraj nacioj« — tiel li skribis — estis disigitaj en la lastaj jarcentoj antaŭ la Unua Mondmilito. Hugo von Hofmannsthal deklaris, ke li elmigros en Svisujon, se la »Anschluss« realiĝos.

Kelkaj konfesoj, kiujn ni citis, estis la konsekvenco de spertoj pri la katastrofo de la granda mondmilito. La itala literaturhistoriisto priskribis tiujn faktojn en sia libro »Il mito absburgico« (»il mito absburgiko« — la habsburga mito). Li deklaras, ke kelkaj el la plej grandaj aŭstraj poetoj ankaŭ post disfalo de la habsburga monarkio estis influataj de rememoroj je ĝi. Ekzemple: **Heimito von Doderer** (Hajmito fon Doderer), aŭtoro de la du romanoj »Die Strudelhofstiege« (»Di Ŝtrudlhofŝtipe« = la Ŝtrudlhofŝtuparo); Strudelhof estis stratnomo en la naŭa distrikto de Vieno, kaj de »Die Dämonen« (Di Demonen« — la demonoj). **Roberto Musil** verkis la »Mann ohne Eigenschaften« (»Man one Ajgenŝaftn« = viro sen kvalitoj), kiu estas tradukita jam en diversajn lingvojn, **Joseph Roth** (Jozef Rot), estas aŭtoro de la »Radetzkymarsch« (»Radeckimarŝ« = marŝkanto), nomita laŭ malnova aŭstra soldat-muzikaĵo, je honoro al la aŭstra feldmarŝalo Radetzký, venkinto en multaj bataloj de la 19-a jarcento.

Bedaŭrinde dum la lastaj jardekoj de la aŭstra-hungara monarkio la kulturaj rilatoj inter la aŭstra kaj la aliaj nacioj en la Danub-valo ne plu funkciis bone kaj daŭre. La nacia ŝovinismo rompita ilin. Malgraŭ tio kelkaj kontaktoj daŭris. Rainer Maria Rilke — ni menciis lin jam — glorigis en siaj poemoj la ĉeĥan poeton Kajetano Tyl kiel aŭtoron de la ĉeĥa nacia himno »Kde domov muj?« (kie estas mia hejmlando«). La kroata verkisto **Ljubomir Marakoviĉ** publikigis la libron »Nova vivo«, en kiu li deklaris sin adepto de la kulturaj ideoj de la aŭstra polihistoriisto Riĥardo Kralik. Lia kunlaboranta poeta amiko estis la delikatsenta **Marin Sabiĉ**. La plej granda eminentulo de la rumana literaturo, **Mikaelo**

Eminescu (Eminesku), kiu loĝis kelkajn jarojn en Vieno, estis ekflamigita por poeziaĵoj de la aŭstra lirikisto **Nikolao Lenau**, mortinta en la jaro 1850. Lenau naskiĝis en la tiama aŭstra kaj hodiaŭ rumana Banato. Pro tio oni povas diri, ke Lenau kaj Eminescu estis sampatrujanoj. Alia rumana verkisto, **Johano Slavici**, havis strangan sorton: dum la tempo de la aŭstra-hungara monarkio, la hungara registaro kondamnis lin pro »rumana iredentismo«; post la malapero de la monarkio la rumana registaro same kondamnis lin pro »aŭstriismo«.

Estas dezirinde, ke ni daŭrigu trakti la temon ankoraŭ pli detale. Jen, estas nebla. Fine mi volas atentigi ĉiujn, kiuj scipovas legi la germanan lingvon, ke mi mem verkis kelkajn librojn pri nia temo: historion de la aŭstra literaturo, publikigitan en la jaro 1946. en Vieno; »historion de la aŭstra ŝtato kaj popolo«, eldonitan de la eldonejo Tyrolia in Innsbruck (Tirolia in Insbruk) kelkajn tagojn antaŭ la kristnaska festo en la jaro 1969. Mia kunlaboranto estis ministeria konsilisto ĉe la ministerio por instruado, doktoro Feliks Romanik. En la »Wissenschaftliche Buchgesellschaft« (»Visnŝaftliche Buhgezelsaft« = scienca libroscieto) en Darmstadt (Darmŝtat, Okcidenta Germanujo) mia libro »Elementoj de historio de la habsburga monarkio kaj de Aŭstrujo« aperis en aŭtuno de la jaro 1970.

Certe la aŭstra historio estis kampo de diversaj tezoj. Tro ofte la politiko ĉesigis laborojn de historiistoj. Dum longtempa epoko ŝovinismo kaj germanaciismo malheligis la veran historion kaj la memstaran evoluon de Aŭstrujo. Ni esperu, ke la vero venku en estonto.